

Literaturaj perloj, 2-a parto
Simpligita anatomio laŭ Raymond Schwartz
Claude Gacond, 244-a radioprelego, 1968.06.12 & 15

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Pasintan semajnon ni legis al vi skeĉon de Raymond Schwartz pri **La fundamentaj elementoj de Esperanto**.

A.- Por hodiaŭ jen alia skeĉo de nia talenta humoristo, kiu tuŝas demandon, kiu en Esperantujo jam fluigis multe da salivo. Tiu skeĉo kritikis neutilajn **neologismojn**. Ĝi estas titolita : **Simpligita anatomio**.

Cl.- « Dum la lastjara libertempo, en rava urbeto de Granda Andujo, mi havis la okazon renkonti mian amikon Ĵak Pomfrit, ĉiaman Esperantiston. Kaj jam dum la interŝanĝo de la kutimaj, kvazaŭprologaj banalaĵoj mi povis konstati ĉe Pomfrit grandan malamikecon kontraŭ neologismoj.

A.- Per si mem tia konstato estas neniel surpriza. Ekzistas ja hodiaŭ multaj, kaj foje normalaj personoj, kiuj ne ŝatas la novajn vortojn.

Cl.- Sed Ĵak Pomfrit, laŭ mia opinio, iom tro forte « skuadis la bankuvon », pretendante, ke

A.- la unua kaj plej danĝera neologismulo estis ... Zamenhof mem ! »

Cl.- « Ne eble,

A.- li dekretis,

Cl.- nombri en nia Fundamento ĉiujn radikojn, kiuj prezentas nure nenecesan pezaĵon por nia lingvo.

A.- Jen ekzemple tiu mizeraspekta **ŝelko!** Ĉu honesta **pantalono-tenilo** ne plene sufiĉus por respondi al ĉiuj postuloj de l' moralo kaj bonedukiteco ?

Cl.- Sed venu do kun mi al la kunvenejo de la Grandanduja grupo, kie mi parolos hodiaŭ pri la homa korpo ! »

A.- Kaj mi iris kaj mi aŭdis.

Cl.- « Gesinjoroj, la homa korpo konsistas el tri partoj. La unua estas la kapo, sur kies tegmento kreskas la kapfadenoj, kelkfoje kaj ĝuste ankaŭ nomitaj pedikarbaro.

A.- Por kaŝi aŭ ornami la kapfadenojn oni surmetas kapkovrilon, kiu ludas ankaŭ la rolon de salutaparato.

Cl.- Sur la kapfasado troviĝas du vidiloj.

A.- Inter ili estas la flarilo, kiu – pli speciale dum la vintraj monatoj – fariĝas mukfonto.

Cl.- Sub la mukfonto malfermiĝas la manĝo-truo, kiun enkadrigas du manĝotru-randoj.

A.- Tre ofte la supra trurando de la matura viro ornamiĝas per brososimila filtrilo, kies ĉefa utileco ŝajne estas malhelpi, ke vermiĉeloj kaj similaĵoj tro rapide malaperu en la manĝotruon.

Cl.- Ĉe ĉarmaj fraŭlinoj kaj junaj edzinoj tiuj manĝotrurandoj nomiĝas ĝenerale kiskusenoj.

A.- Se ni eniras en la manĝotruon, ni vidas, ke ĝi entenas multajn maĉilojn – ĝis 32 – kaj unu ordiganton.

Cl.- La ordiganto zorgas ne nur pri justa disdono de la maĉlaboro, sed ankaŭ pri purigado de la maĉiloj kaj pri forigo, pli aŭ malpli brua, de eventualaj ĝenantoj.

A.- Tiu ordiganto estas tial tre okupita kaj preskaŭ ĉiam restas hejme.

Literaturaj perloj, 2-a parto
Simpligita anatomio laŭ Raymond Schwartz
Claude Gacond, 244-a radioprelego, 1968.06.12 & 15

Cl.- Ĝi eliras nur ĉe solenaj okazoj kaj eĉ tiam nur dum mallonga tempo.

A.- Ambaŭflanke de la kapo kreskas la kapfolioj, nomitaj ankaŭ aŭdiloj, kies rolo dum la junaj jaroj de l' homido estas ĉefe pedagogia.

Cl.- Dum tiu periodo ili nomiĝas pinĉkarno.

A.- Poste ili malhelpas, ke la salutaparato kovru la tutan kapon.

Cl.- Inter la kapo kaj la brusto troviĝas la kravattubo, kiu estas kvazaŭ kanalo inter la manĝotruo kaj la digestujo.

A.- Ambaŭflanke de la busto pendas la signalstangoj, ĉe kies ekstremaĵo senriproze moviĝas la universalaj preniloj.

Cl.- En la centro de la busto modeste sin kaŝas la polvonesto, kies utileco estas tute relativa.

A.- Por sin movigi la homo posedas du ir-stangojn, kiuj aspektas kiel natura plilongigo de la sidkarno.

Cl.- Krom tio la ir-stangoj havas ankoraŭ alian utilecon :

A.- ĉe la viroj ili donas certan rigidecon al la pantalono,

Cl.- dum ĉe la inaj elementoj ili centprocente pravigas la araban proverbon, kiu asertas, ke
« *la beleco de silkaj ŝtrumpoj dependas de la enhavo.* »

A.- La ekstremaĵo de la ir-stango nomiĝas ŝukarno, tiel nomita, ĉar estas ĝi, kiu plenigas la ŝuon.

Cl.- Dank'al sia ŝukarno la homo povas stari.

A.- Kaj nun vi povas hejmeniri. »

Cl.- Tiun skeĉon de Raymond Schwartz titolita **Simpligita anatomio** vi povas relegi en *La Ĝoja podio*.

A.- Kiam ni trafolias la lernolibrojn pri esperanto, ni ĉiam miras pri la manko de tiaj tekstoj, kiuj stile estas lertaĵoj.

Cl.- Komuna lingva spirito kreiĝas per studado sur la lernejoj de similaj literaturaj perloj. Kiel ĉiuj francaj geknaboj amikiĝis kun la **Vulpo kaj la Cikonio** de **La Fontaine** aŭ eksonĝis kun la **Eta Princo** de **Saint-Exupéry**, ĉiuj esperantaj geknaboj devus povi ridegi je la humuro de Raymond Schwartz.

A.- Kiom da vortoj elvokus tiel por ĉiuj esperantistoj la samaj beletraj rememoroj : kapfadenoj, pedikarbaro, salutaparato, vidiloj, flariloj, mukfonto, manĝotru-randoj, pinĉkarno, sidkarno, ŝukarno, universalaj preniloj, polvonesto.

Cl.- Kaj **Ĵak Pomfrit** fariĝus heroo komuna al tuta Esperantujo, kiel **Olive** kaj **Marius** estas heroo, kiun neniu franco ne konas.

A.- Ne plu sufiĉas instrui la elementojn de la esperanta gramatiko. Fariĝas necese konduki la idojn de la esperantistoj kaj la partoprenantojn de esperanto-kursoj al tekstoj, kiel tiu, kiun vi aŭdis hodiaŭ.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-